# *Kubo subtenas Venezuelon fronte al milita agresemo de Usono.*



Havano, 19 feb (RHK) La kuba ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez, denuncis en tiu ?i urbo dum gazetara konferenco, la intencojn de Usono milite agresi Venezuelon.

Rodríguez anka? rifuzis la klopodojn de la prezidento Donald Trump timigi ?iujn, ?ar «ne eblas ke la subteno vere humanitara estu bazita sur perforto a? malrespekto al la internacia juro,» asertis la kuba diplomato.

La kuba ministro memorigis ke la prezidento Trump kaj aliaj funkciuloj kaj heroldoj de la usona registaro, ?i-lunde ripetis kaj konfirmis ke la milita opcio estas inter la elektebloj; samkiel en aliaj momentoj, oni uzadis noblajn ka?zojn kiel pretekstojn por invadi aliajn landojn.

Bruno Rodríguez alvokis ?iujn registarojn, parlamentojn, politikajn fortojn, popolajn organizojn, sociajn, indi?enajn, naciajn kaj internaciajn organizojn, anka? ne registarajn, publike esprimi sian sintenon fronte al la uzo de milita forto flanke de Usono en Sudameriko.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/183896-kubo-subtenas-venezuelon-fronte-al-milita-agresemo-de-usono

# Radio Habana Cuba